n-ro 34

Septembro 1991

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

# La Merkato

Estimataj legantoj,

Jam pasis pli ol duona jaro post la antaŭa *La Merkato*. Pro sinsekvo de malfavoraj cirkonstancoj, ne eblis produkti novan numeron pli frue. La estraro de IKEF pardonpetas pro tio.

Eĉ ĉi tiu numero ne estas "normala". Mankas kelkaj kutimaj rubrikoj, sed aliflanke enestas plurpaĝa raporto pri la pasinta universala kongreso.

Ni faros nian eblon por ekde nun rekapti la kutiman aperritmon.

Roland ROTSAERT

Enhavo

| | |
|---|---|
| Informoj pri IKEF | 2 |
| Novaj membroj | 2 |
| Raportoj pri Universala Kongreso en Bergen | 3-9 |
| Bilanco kaj spezokonto de IKEF je 90.12.31 | 10 |
| Anoncoj | 11 |
| Kolokvoj "China Aktief", oktobro 1991, Oostende | 12 |

La Merkato (LM) estas organo de IKEF; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**Financa sidejo kaj membro-administrado:**
Ĉe s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97,
B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

**Redaktora sidejo:**
Ĉe s-ro Daniel **König**, Schwarzwaldstraße 47
D-W6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

## Novaj membroj

120. S-ro Marko KRESPAN, V. G. Chinotto 18/3, I-33100 UDINE
121. Inĝ. Dan BACILA, Str. Petru Maior nr. 4, R-1800 LUGOJ
122. S-ino Sonja ROELANDTS, Flor de Pauwstr. 69, B-1070 BRUSSEL, Belgio
123. S-ro Maciej WNUK, ul. Zeromskiego 17, poste restante, PL-WARSZAWA 82, Pollando
124. S-ro Miroslav VOLNY, postnovni schranka 26, CS-738 02 FRYDEK-MISTEK, Ĉeĥoslovakio
125. S-ro Ŝaig Bäramoglu MÄMMÄDOV, Sovetia Esperantisto, Ĥuluflu 29/52, SU-37033 BAKY-33, Soveta Unio
126. S-ro Alfred SCHUBERT, Forst-Templhof 10, D-W-8219 WESSOBRUNN, Germanio
127. S-ro BAJAKI Imre, Vöröshadsereg utja 61.V.75, H-6100 KISKUNFELEGYHAZA, Hungario
128. S-ro Josef ŜEMER, Binjamini 6, IL-67459 TEL-AVIV, Israelo
129. S-ro Janusz KRUPSKI, ul. Srebrzynska 47 m.52, PL-91-082 LODZ, Pollando
130. S-ro Guido GRATTAPAGLIA, SQS 204 - BLOCO "H" - APTO 204 - ASA SUL, BR-70234 BRASILIA (DF), Brazilo
131. S-ro ĜURĜEVIĈ Petar, Ranka Ŝipke 40 A, YU-78000 BANJA-LUKA, Jugoslavio
132. S-ro LEE Jung-Kee, C.P.O. Kesto 3047, SEOUL, Koreio
133. SMITH AND WESSON, Quai du Roi Albert 33-002, B-4020 LIEGE, Belgio
134. S-ro Bo SANDELIN, Södra Stommen 112, S-438 00 LANDVETTER, Svedio
135. S-ro Gu Tingwei, Foreign Economic Exchanges and Trade Corp. Fushun, Nos 7-1, No 9 Roal West Xin Fu, District Fushun, Liaoning, Ĉinio





Generala Kunveno
(dimanĉo, 28 julio, 39 ĉeestantoj el kiuj 13 membroj)

### Raporto de la Prezidanto

Post salutvortoj, prezento de la estraranoj kaj praktikaj klarigoj, la prezidanto daŭrigas:

*Se iuj volas membriĝi dum ĉi tiu kunveno, ili povas je la fino plenigi aliĝilon kaj pagi la kotizon de 120 norvegaj kronoj. Ĉi tiu kotizo validas por la resto de la jaro 1991 kaj por la tuta jaro 1992 (18 monatoj). (...)*

*Por la plivastigo de Esperanto ne sufiĉas nur literaturo, beletro kaj nura babilado - kvankam mi per tio ne volas bagateligi tion. Estonte pli gravos la praktika uzo de Esperanto en scienco, tekniko, ekonomio, turismo. (...)*

*Jen niaj ĉefaj agadoj:*

*- Eldono de terminaroj: Komerca Terminaro (ankoraŭ estas havebla - prezo: 80 kronoj). Ekofomo ankoraŭ estas en prilaborado. Estas malfruiĝo pro manko de kunlaborantoj/ reviziantoj en nia Terminika Sekcio.*

*- Ebligi renkontiĝojn, organizi studseminariojn: Identeca ŝildaro estas havebla. Jam trifoje aranĝita de la hungaraj ekonomistaj Esperantistoj estas ekonomia simpozio en Budapest. La ĉi-jare planitan IKEF-seminarion en La Chaux-de-Fonds ni devis nuligi pro financaj problemoj de KCE. Doktoro Bormann lekcias regule en IAS. Li verkis por tio 58-paĝan broŝuron "Konjunkturpolitiko - Inter senlaboreco kaj inflacio".*

*- Helpi membrojn: IKEF mem ne negocas, sed donas helpon ĉe informada kaj vastsence ankaŭ ĉe vara interŝanĝo.*

La prezidanto montras tiurilatajn leterojn.

- Eldoni fakajn revuojn, verki fakajn artikolojn:
Ekonomia Bulteno pri Usono de Doktoro Goldman. (...)
MONATO estas "internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo". Ni prenas MONATOn kiel nian podion por ekonomiaj artikoloj. Avantaĝoj: (1) ni ŝparas fortojn por propra magazino, (2) MONATO havas sufiĉe vastan legantaron, (3) artikolo en ĝi ne kostas, sed alportas monon en formo de honorario al la verkinto.
FOKUSO, prizorgata de EKOESP (Ekonomikista Grupo de HEA), havas problemojn pro la politika ŝanĝo en Hungario.
MONDA MERKATO, - tutmonda gazeto kun anoncoj de entreprenoj kaj privataj personoj, tute nova eldonajho de nia membro Alfred Schubert, Germanio.
Mi memorigas al KIU FARAS KION, indekso de la Mozaj produktajhoj farita de nia membro F.X. Gilbert, Chambre de Commerce et d'Industrie de la Meuse, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj. Oni planas novan eldonon.

- Instigi al aperigo de komercaj anoncoj: ege valora agado, ĉar (1) traduko de reklamaj tekstoj estas bonega kaj utilega ekzercado; (2) reklamsekciestroj de firmaoj konatiĝas kun Esperanto, (3) alportas monon en la kasojn de Esperanto, IKEF ricevas 15 % maklerajho.

Alia afero estas aldono de Esperanto kiel plua lingvo sur pakumoj, instrukcioj pri uzo kaj sekureco, k.t.p.

En la lastaj du jaroj la politika mondo totale ŝanĝiĝis. La iamaj socialismaj landoj en orienta Eŭropo fariĝis vere demokrataj kaj Ĉinio malfermis sin. Sed la ŝanĝo de la ŝtataj burokrataj ekonomisistemoj kun malmodernaj fabrikoj al libera merkatekonomia sistemo kun konkur-kapablaj produktadaj metodoj daŭros pli longe. Ĉar la iamaj netralasivaj ŝtatlimoj (fera kurteno) ne plu ekzistas, la homoj en tiuj landoj sopiras al kontaktoj kun okcidentaj kompanioj por rapida akiro de okcidentaj varoj kaj s+s (scio + sperto, know how). (...)

Nia membro, sinjoro Ruig, konstatas la problemon en sia letero de la 2a de aprilo 1991 al sinjoro Rotsaert kaj en sia letero de la 30a de majo al mi. "Nun por Esperanto venas la horo de la vero".



Financa raporto (prezentita de Roland Rotsaert)

Sur via seĝo vi trovis la spezokonton kaj bilancon je 31 decembro 1990. [teksto troviĝas tuj post la UK-raportoj]

IKEF finis la pasintan jaron kun deficito de 4 954 frankoj, kompare kun pluso de 22 975 frankoj dum la antaŭa jaro (dum kiu tamen estis eksterordinara donaco de 20 000 frankoj).

Plej rimarkinde dum 1990 estis alfluo de informpetoj el orienteŭropaj landoj kun liberiĝinta ekonomio. Al la informpetantoj kaj al aliaj adresoj kiuj ŝajnis interesaj mi sendis unu aŭ plurajn numerojn de "La Merkato" (kies eldonkvanto kelkajn fojojn atingis 200 ekzemplerojn) kaj la novan IKEF-informfolion.

La ero "kostoj de informado" en la spezokonto enhavas nur la kostojn de la IKEF-informfolio, de kiu restas ankoraŭ stoko por 1 aŭ 2 jaroj. Granda parto, eble triono, de la kostoj de afranko kaj revuo fakte ankaŭ estas kaŝitaj kostoj de informado.

Pro la konataj pagproblemoj, el tiuj sufiĉe grandaj elspezoj rezultis nur malmultaj aliĝoj (plejparte pagitaj de "okcidentuloj"). Cetere, ankoraŭ restas kelkaj pendantaj aliĝoj de kandidat-membroj kiuj promesis, sed ĝis nun ne sukcesis pagi.

De la Komerca Terminaro vendiĝis malpli da ekzempleroj ol mi esperis. Parta klarigo estas la ne-ĉeesto de IKEF en internaciaj aranĝoj, ekzemple la UK en Kubo. De la terminaro restas (je sorfino) ĉirkaŭ 100 ekzempleroj ĉe mi, ĉe estraranoj kaj ĉe la eldonejo.

La IKEF-kotizo en usonaj dolaroj (20 dolaroj) pro kurzfalo de tiu valuto fine de 1990 nur reprezentas 75 % de la baza kotizo (400 belgaj frankoj). Malgraŭ tio mi proponas lasi la kotizon en dolaroj je tiu nivelo ĉar nur malmultaj kotizoj estas pagitaj en tiu valuto; precipe temas pri triamondaj landoj. Intertempe la kurzo de la dolaro altiĝis kaj tiu problemo grandparte solviĝis.

Post la forpaso de s-ro Voit ne plu restas dumvivaj membroj. Mi opinias ke ni konservu tiun kapitalon por garantii la membrecon al eblaj postaj dumvivaj membroj.

Akcepto de la raportoj

La membroj akceptas la raportojn kaj decidas likvidi la malgajnon per eluzo el la kapitalo.

Elektoj

La membroj reelektas la estraranojn Gether (Hungario), Gilbert (Francio), König (Germanio), Rotsaert (Belgio) kaj Yamasaki (Japanio).

Statuto

En la numeroj 32 kaj 33 de *La Merkato* aperis alvoko por komuniki ŝanĝdeziroj rilate al nia statuto. Ĉar preskaŭ ne venis reagoj, la prezidanto konkludas ke ŝanĝo ne necesas.

Diskutado

Sinjoro Princz, reprezentanto de UEA, laŭdas IKEF pro ĝia elstara funkciado kompare al multaj aliaj fakaj organizoj de la Esperanto-movado.

Doktoro Goldman alte taksas la seminariojn pri ekonomio en Budapeŝto okazigitajn de EKOESP.

Sinjoro Heckhausen anoncas ke la urbo Aalen pretas disponigi salonojn por nova seminario.

Sinjoro Cwik proponas tradukon de la traktajho de la Eŭropa Komunumo, uzante servon de BSO/DLT. Al tio venas reago ke tia traduko estas afero por juristoj. Sinjoro Braun pretas kontakti BSO/DLT por esplori eblecon de tradukoj ĝenerale.

Sinjoroj Cwik kaj Bormann rimarkas ke la fakgrupo traktas la praktikan komercon (mikro-ekonomion). Aliflanke estas ekonomiko (makro-ekonomio, ekonomia scienco). Oni konfirmas ke IKEF ampleksas ambaŭ. Se ni estus havontaj iutage sufiĉe da membroj, ni povos formi subgrupojn pri komerco kaj ĝenerala ekonomio kaj pri ekonomiko.



Sinjoroj Texier kaj Heckhausen demandas pri utilo de reklamanoncoj kaj ĉu la firmaoj povas kontroli efikon. Respondoj: (1) kontrolo de efiko ne eblas, ĉar ĝi ne estas konstatebla en la (internacia) vendocifero; (2) Monato estas unika revuo por tia reklamo, ĉar ĝi estas vaste disvastigata; (3) sinjoro Braun mencias ke oni bezonas personajn rilatojn kun estroj de reklamsekcioj por akiri anoncojn.

En sia raporto, la prezidanto jam menciis la petojn pri komercaj interŝanĝoj kun orienta Eŭropo kaj Ĉinio. Jen resumo de la diskuto pri tio:
Oni dissendu tiajn petojn (en konciza formo) al IKEF-anoj. Koncernitaj anoj rekte alskribu la ofertintojn. Opinisondo inter la 8 restantaj membroj rezultis en tio, ke 5 el 8 estus pretaj konsenti pri plialtiĝo de kotizo - ĝis la duoblo de la hodiaŭa kotizo - se necesas. La estraro preparos organizadon de tio je plej malmultaj kostoj kaj plej bona efiko.

Dum la ĝenerala kunveno



Raporto pri vizitoj

Post la bonega sukceso de la vizito en 1988 (UK Rotterdam) al la tiea komerca ĉambro, tiam aranĝita de nia membro Kees Ruig, la estraro planis organizi tiajn vizitojn okaze de ĉiu UK. En Bergen profesoro Wickström bonege prizorgis la organizon de du vizitoj. Li ankaŭ prizorgis la tradukon norvege/esperante, kun helpo de norvego kaj svedo.

Komerca Altlernejo Bergen (Norges Handelshoyskole)

En la vizito partoprenis 20 personoj. Krom membroj de IKEF estis ankaŭ kelkaj prelegantoj de la Internacia Kongresa Universitato.

Ni estis akceptitaj de la direktoro, Sigismund KOESTER, la dekano, Rolf-Jens BLUNSTAD kaj la estro de la esplorcentro, Einar HOPE.

Oni klarigis la strukuron kaj funkciadon de la altlernejo. La instruado estas ĉefe dispartigita en sekcio pri ekonomiaj-administraj fakoj kaj sekcio pri ĝeneralaj fakoj (ekzemple lingvoj, ekonomia geografio kaj historio.

Prof. Wickström transdonas IKEF-donacojn al S. Koester



La instrulingvo estas ĝenerale la norvega; nur la kursoprogramo "Master of International Business" okazas en la angla. La studado estas je alta nivelo; pro tio la kondiĉoj por ekstudi en la altlernejo estas severaj: el ĉ. 2000 kandidatoj estas nur 400 akceptitaj.

La averaĝa nombro de studentoj estas 2800. Entute 425 profesoroj/instruistoj/aliaj dungitoj efektivigas la altlernejon kun buĝeto de 425 milionoj da kronoj.

En la esplorcentro laboras 200 personoj. Ĝi estas fondajho kiu devas akiri siajn enspezojn farante studojn por entreprenoj. La rezulto de tiuj studoj estas publika.

Statoil

Por tiu vizito estis 32 ĉeestantoj (IKEF-anoj kaj aliaj invititaj personoj). Sinjoro Lars Gunnar DAHLE, estro pri informado, klarigis la ekeston de Statoil. Ĝi estas 100 %-a ŝtata kompanio fondita en 1972. Ĝi esploras, ekstraktas kaj rafinas petrolon kaj gason kaj vendas la produktojn en propraj benzinstacioj en Skandinavaj landoj. Estis 13.000 dungitoj, el kiuj 8.000 en Norvegio. Oni antaŭvidas ke en estonteco produktado de gaso iĝos pli kaj pli grava.

La publiko ricevis teknikajn klarigojn per bildoj, filmo kaj modeloj de platformoj. Ankaŭ la laborkondiĉoj sur la platformoj estis priparolataj. Sur platformo "Gullfaks" ekzemple daŭre laboras 250 personoj.

Kunvenoj de la Terminologia Centro de UEA

En la unua kunveno sinjoro Braun prezentis raporton pri la realigoj kaj planoj de IKEF rilate al terminologia laboro faritan de sinjoro Rotsaert. Ĉar komputilo nuntempe estas nepre necesa helpilo por terminologia laboro, oni decidis organizi plian kunvenon kun komputistoj.

Dum tiu kunveno evidentiĝis ke eble deko da personoj havas iun perkomputilan terminologian projekton. Bedaŭrinde preskaŭ tute mankas kunordigo. TEC registris la diversajn projekton kaj daŭrigos la interŝanĝon de informoj perpoŝte.

[illegible]

| [illegible] | [illegible] | | | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | | | | |
| [illegible] | [illegible] | - | - | | | | |
| [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | | | | |
| [illegible] | - | [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | - | [illegible] |
| | ------ | ------ | ------ | | ------ | ------ | ------ |
| | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | [illegible] |

[illegible]

| | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | [illegible] | - | - | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | |
| [illegible] | - | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | |
| | | | | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| | ------ | ------ | ------ | | ------ | ------ | ------ |
| | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | [illegible] |

## Kolokvo "TAAL EN BEDRIJF" (Lingvo kaj Entrepreno)

Je la 20a-22a de novembro 1992 okazos en Gent, Belgio, kolokvo pri la multlingva komunikado en entreprenoj. Laborlingvoj estos nederlanda, franca, germana kaj angla. Petu informilon kun detalaj informoj (i.a. pri dezirataj temoj de prelegoj) de:

Provinciale Hogeschool voor Vertalers en Tolken
Colloquium "Taal en Bedrijf"
Brusselsepoortstraat 93
B-9000 Gent, Belgio

"Kiu posedas Danion"?

La konzernoj kaj la Fondoj posedas!
Samspecaj en ĉiuj Industrilandoj.

Reduktita libro-prezo
2o danaj kronoj

Libroservo: Dana-LEA, Edvard Griegs Gade 28,
DK 2loo Kopenhago, Danio.
ĝiro 7 o4 5o 69

**COVALEX S.A.**
Chemin des Voirambeys
CH - 3974 MOLLENS
(Svislando)

... jam de longe konas
la fabrikantojn de la altkvalitaj produktoj
kiuj nur en Svislando ekzistas
kaj kiujn vi ne ankoraŭ trovis

... aŭ elektronikaj eroj
... aŭ vinoj
... aŭ ŝipoj
... aŭ bankaj servoj
... aŭ ... ??? ... ĉu ne ?

Profesie - Fidinde - Diskrete

eldonas komputerprogramojn (IBM aŭ kongruajn)
ŝanĝas, adaptas elektronikajn informojn el unu
al alian sistemon (diskoj - disketoj)

Telefono ++-41-27 / 41 62 45
Telefakso ++ 41-27 / 41 90 65 ("Fax")

# CHINA AKTIEF

# Kursaal Oostende (Belgio)

2 ĝis 9 oktobro 1991

Ekspozicio de ĉinaj industriaj teknikoj kaj produktaĵoj

Komerca foiro - Simpozioj (3 okt.: Esperanta)

organizo de Jonge Economische Kamer (Jaycees) Oostende

kaj Hua Yang Corp., Beijing (Ĉinio)

En la ekspozicio estos montrata granda gamo de ĉinaj produktoj en kampoj de elektroniko, kemio, medicino, tekstilo, k.t.p.

Kolokvoj je 2 kaj 3 oktobro 1991
(nederlanda kaj angla lingvoj)

Dum du tagoj diversaj belgaj kaj ĉinaj paroladantoj pritraktos temojn rilate al komerco kun Ĉinio.

Kotizo: 13.780 BEF (bankkonto numero 001-0077568-44 ĉe ASLK-banko, de "Jaycees", p.a. Thierry KOCH, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende)

La kotizo inkluzivas: du lunĉojn, informpakaĵon, daŭran enirpermeson al la ekspoziciejo por 4 personoj.

Detalaj informoj haveblaj ĉe: Bart VANSEVENANT, Komerca Ĉambro, Archimedesstraat 15-11, B-8400 Oostende (telefakso 059-70.52.18).

Kolokvo je 5 oktobro (esperante)

Prelegos pri komerco kun Ĉinio i.a.: F.J. Braun (D, prezidanto de IKEF), Shen Chenru (CN, Academia Sinica), Grégoire Maertens (B, UEA), Kees Ruig (NL, direktoro de komerca ĉambro).

Kotizo: 300 BEF (bankkonto 850-8835110-57 de Esperanto-klubo La Konko, Paul Michielslaan 10, B-8400 Oostende).
Eksterlandanoj povas skribe anonci sin kaj pagi je alveno.

La kotizo inkluzivas du kafpaŭzojn kaj enirpermeson al la ekspoziciejo.